


# NORMANDA ESPERANTO BULTENO


N° 269

Oktobro 2017



Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48
ivnicolas@sfr.fr Enpaĝigas : Michèle Langeois

Abon-kotizo : 10 €. « Esperanto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasistino : Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier. 76600 Le Havre




## Mia kara Normandio

1 Mia kara Normandio, la fora,
Ĉielarko en la viv' senkolora,
Invitanta, atendanta, amika
For de mia rutinado formika,
Kalvadosa, kantemula, sentrista,
Esperanta kaj eĉ esperantista.

2 Mia kara Normandio, la gaja,
Estas bela tag' hodiaù, mezmaja,
Kaj printempo jam someron alvokas,
Kaj mi ĝojas, ke ĉi tien min lokas
La destino, mia dam' de la koro
Por la tagoj da ĝuinda laboro.



3 Mia kara Normandio ĝemela,
Portas mi al vi salutojn nun de la
Eta urbo rusa, plu vin ŝatanta,
Por senĉesa amikeco konstanta.
Ja neniaj politikaj kvereloj
Gravas tro por ni, la bonaj ĝemeloj.

4 Mia kara Normandio, la ĉarma,
Estu via viv' neniam alarma.
Ĉiuj plagoj, disreviĝoj, doloroj
Iru for el la animoj kaj koroj.
Kaj feliĉan vivon nian subsune
En konkordo daùre kreu ni kune.

**Mikaelo Bronŝtejn** (Tiĥvino, Rusio)
Flers, la 13an de majo 2017. (verkis survoje en la trajno, kaj kantis ĝin dum la Ĝenerala Asembleo normanda)

**ENHAVO**


p.1 Poemo "Mia kara Normandio" Mikaelo Bronŝtejn
p.2 De la normandaj kluboj
p.3 Kio estas Kaori Komine ? Gérard kaj Gigi Sénécal
p.4 Recepto Brigitte Cottin
Krankonkuko Henri Rousseau
p.5 Praktikaj uzoj de esperanto
p.6 et 7 Ĝenerala Asembleo en Flers
Anne-Marie Leprévost kaj Yves Nicolas
p.8 Esperanto muziko en Normandio
Lino Markov
Pri la vizito de la 14a de oktobro
Normanda asocio Kotizo

***Adiaù, amikoj niaj !***

Antaù ol dediĉi novajn fortojn al la rekomenco de aktivecoj, ni retrospektivu al la teruraj batoj travivitaj de la Havra Grupo en 2017.

Ni memoru pri karaj personoj kiujn iam vi eble renkontis. Kun granda bedaùro, ni adiaùas al ili :

**Jean Colombel** estis bonega amiko, sincera en siaj engaĝiĝoj kaj tre helpema en siaj agoj. Esperanto kongruis kun lia homamo (legu la aprilan bultenon)

**Madeleine Nardin** aliĝis al nia klubo en la sepdekaj jaroj kaj uzis Esperanton dum siaj migradoj. Ŝi forpasis en majo.

**Simone Sery** estis volontema samideanino. La internacia lingvo konvinkis ŝin pro sia sennacieco kaj kiel ilo por paco. Travivinte la krizojn kaj ekribelojn de la dudeka jarcento, ŝi estis nia plej aĝa klubanino. Ŝi mortis 98 jaraĝa en junio.

**Elisabeth Jean** forlasis nin en aùgusto. Ŝi estis 71 jaraĝa. Elisabeth estis ja fidela kaj sentema amikino. Laù ŝi, Esperanto valoris kiel nekontestebla rimedo por homa interkompreniĝo. Ŝi fervore lernis ĝin kaj iĝis lerta parolantino kun niaj eksterlandaj vizitantoj.

Ilia ĉeesto, laù la fluo de la jaroj, havigis al ni amikecon kaj komplicecon. Ni esperu, ke ilia estinta energio inspiros nin ĉar nune nia asocio devas retrovi stabilecon kaj novajn fortojn.

***Sylvie Caron (76)***

**REPRISE des COURS**

**Le Havre**

Du nouveau dans le monde de l'Esperanto au Havre !

Dès la rentrée d'octobre 2017, le Groupe Espérantiste du Havre va organiser une « Babilrondo » ( salon où l'on cause ), le troisième samedi de chaque mois, Maison Percanville, Rez-de-chaussée, 30 rue Percanville ( Quartier Saint-François ) de 17 heures à 19 heures.

La « première » aura lieu le samedi 21 octobre. Elle s'adressera à tous : sympathisant, débutant ou confirmé, afin de perfectionner ou découvrir l'Espéranto.

Afin de nous préparer pour cet évènement ( la salle est grande, mais sait-on jamais … ), pourriez-vous nous dire d'ores et déjà si vous souhaitez nous rejoindre, et quel est votre niveau. Et si nécessaire, si un thème particulier vous tient à cœur ( par exemple : l'espéranto de survie, de voyage, de cuisine, d'alpinisme, de philosophie ; toute idée sera la bienvenue )

Venez accompagnés si vous le souhaitez, l'espéranto s'adresse à tous, petits ou grands, quel que soit votre niveau.

A bientôt !

**HEG ( Havra Esperantista Grupo )**

**Ankaù kursoj** en :

**Flers** : Anne-Marie Leprévost, 02 33 65 41 81, lepam.flers@gmail.com

**Hérouville-Saint-Clair** : Gérard Sénécal, 06 89 74 26 65, gigesenecal@gmail.com

**Sud-Manche** (Granville kaj Coutances) : Christian Levesque, 02 33 91 75 08, lesleveque@wanadoo.fr

**Rouen** : Matthieu Lecesne, , matthieulecesne@yahoo.fr

Adhérez, ré-adhérez, aux **associations nationales et internationales**

**Esperanto-France** : www.esperanto-france.org, 01 42 786 886, 4bis, rue de la Cerisaie, 75 004 Paris

**SAT-Amikaro** : www.sat-amikaro.org, 09 53 50 99 58, 132/134 bd Vincent-Auriol, 75 013 Paris


**Universala Esperanto Asocio (UEA)** : www.uea.org, +31 10 436 1044, (eblas aliĝi per Esperanto-France). Kongreso 2018 : Lisbono (Portugalio)

**Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)** : www.satesperanto.org, 09 53 50 99 58, por aliĝi : Barthélémy Maurau, 3, allée Nathalie Sarraute, 27 000 Evreux. Kongreso 2018 : Kragujuvac (Serbio)

**Staĝi en Francio**

Centre Espéranto “Kvinpetalo” : informoj@kvinpetalo.org, 86 410Bouresse.

Maison culturelle de l'Espéranto, château de Grésillon : gresillon.org, 49 150 Baugé



## Kiu estas Kaori KOMINE ?

Kaori Komine. Tiun nomon ni sendube forgesos sed la vizaĝon kaj la rakonton kiun ni aŭdis de tiu juna virino tiun ĉi vendredon, la 28an de aprilo 2017, ni verŝajne neniam forgesos!

Gigi kaj mi, dum nia printempa vojaĝo tra Japanio, estis ĵus alvenintaj en la stacidomon de Sendai, apenaŭ bonvenigitaj de nia amikino Keiko Sanpei, kiam oni proponis al ni veturi per aŭto al Matsushima. Por la ses samideanoj kiuj partoprenis kun ni en la Tohoku kongreso en 2008, tiu nomo memorigas ion, ĉu ne? En la tiea kongresejo proksime de la marbordo, ni prelegis, ni dancis, ni kantis, ni festenumis kaj tranoktis … La 11an de marto 2011, granda cunamo subakvigis ĉion.

Kun Keiko Sanpei kaj du aliaj esperantistinoj, ni reiris surloken. Estis tie malfacile retrovi la ĝustan lokon kie staris la kongresejo ĉar ĉiujn dekonstruitajn domojn kaj konstruaĵojn oni komplete malaperigis. Tamen post pluraj demandoj al lokaj loĝantoj, ni finfine trovis. El la granda kongresejo restas videblaj nur fundamentoj kaj ie-tie malaltaj murpecoj el betono. Fronte de la eks-kongresejo, duno el sablo, antaŭe kovrita laŭdire per mil pinarboj, nun tute nudas. Alproksimiĝinte, ni malkovris tre junaj pinarbojn antaŭe nelonge plantitaj sur la duno restaŭrita laŭ ĝia antaŭa aspekto.

Ni poste vizitis, en la najbara urbeto Nobiru, muzeon pri la katastrofo kiu okazis la11an de marto 2011. Tie ni renkontis **Kaori Komine**. Kaori laboras en tiu muzeo. Ŝi estas bela juna virino, eble tridek-tridekkvin jaraĝa. En marto 2011 ŝi loĝis en la gepatra domo, en kvartalo de Nobiru inter la duno kaj la malantaŭa monteto.

11an de marto 2011, 14:46. Neĝis sur la Tohoku regiono. En sia domo Kaori estis leĝere vestita kiam 120 kilometrojn for de la marbordo okazis en la Pacifika Oceano tre forta tertremo. Tiu ĉi tremo sekvis antaŭajn malpli fortajn kiuj okazis ekde la 9an de marto.Ĉirkaŭ dek minutojn post la tertremo, giganta ondo alvenis, tiel alta ke neniu protekto, eĉ la plej altaj digoj, havis efikon.



Kaori estis surstrate antaŭ sia domo kun sia onklino kiam la ondego alvenis kunportante ĉion. Vidinte flosantan tatamon proksime, ili sukcesis kroĉi ĝin, bedaŭrinde nur momente ĉar la tatamo fortege frapis muron. La du virinoj maltenis la tatamon kaj samtempe Kaori perdis sian onklinon. Tiam alvenis dua ondego kiu kunportis la junulinon. Bonŝance ŝi suksesis ĉirkaŭpreni flosantan arbon kaj ne forlasis ĝin ĝis kiam ambaŭ grundis en la rubojn, ĉiujn rompitajn aĵojn kaj kadavrojn. Ŝi longe serĉis sian onklinon inter ĉiuj rompitaĵoj kaj mortintojn. Ŝi finfine retrovis ŝian senvivan korpon pli poste.

Sen videbla emocio Kaori rakontis. Bedaŭrinde, eble ĉar ili estis tre kortuŝitaj, niaj akompanantinoj ne tradukis ĉion el ŝia parolado. Ĉiuj ĉirkaŭ ŝi ne perdis el la vido la vizaĝon de la juna virino. Granda kaj tute neatendita surprizo atendis nin kiam ŝi konfesis ion tre gravan. Mi jam menciis, ke neĝis kaj ke Kaori estis leĝere vestita kiam ŝi surstrate eldomiĝis. Post sia eksterordinara "vojaĝo" sur tatamo kaj arbo, ŝi estis kvazaŭ nuda! "Tio estas la plej granda honto el mia tuta vivo!" diris ŝi. Vivanta, certe, sed preskaŭ aŭ tute nuda!!!

Nia eta grupo ne facile povis forlasi la junan virinon. La Japaninoj daŭre demandis ŝin, ofte forgesante traduki ĉu la demandojn, ĉu la respondojn. La mirakle postvivanta Kaori Komine asertis, ke rakonti kaj rakonti la eventojn helpas ŝin por antaŭvidi sian estontecon…

Ŝiaj paroloj longe restos en niaj memoroj.

**Gérard kaj Gigi Sénécal (14)**



Tie ni kongresis en 2008

Gigi, Kaori, Gérard



## SALITA KEKSO KUN GRIZAJ SALIKOKOJ KAJ KAROTOJ


**Ingrediencoj**

Tri ovoj, ducent gramoj da faruno, unu decilitro da lakto, cent gramoj da raspita grujero, ducent gramoj da senŝeligitaj grizaj salikokoj, ses supkuleroj da olivoleo, suko el unu citrono, iom da hakita aneto, kvin gramoj da bakpulvoro, sepdekkvin gramoj da raspitaj karotoj, iomete da butero.

**Preparado**

Antaŭvarmigu la bakujon, metu la varmoregulilon je cent okdek gradoj.
En ujo, miksu la farunon, la ovojn, la lakton, la citronsukon, la olivoleon, la bakpulvoron.
Kiam la miksaĵo estas kontentige homogena, aldonu la raspitan grujeron, la grizajn salikokojn, la hakitan aneton, la raspitajn karotojn, salon kaj pipron.
Verŝu la preparaĵon en iomete buteritan keksmuldilon kaj baku ĝin dum tridek minutoj.
Bonan apetiton !

**Brigitte Cottin (14)**



DANKON BRIGITTE PRO CIA "KRANGONKUKO" !

**Henri Rousseau (14)**

La 9-an de majo, vicis je Brigitte animadi la mardan kunvenon de nia Heruvila esperantista rondo. Ŝi tiufoje instruis al ni la recepton de ia salita kuko kies baza elemento estis … "krangonoj".

Krangonoj ? ! Kio estas ? Manĝeblas ?

Feliĉe, nia kluba PIV-o estis sur la tablo, kaj ĝi min konfirmis ke tio nur estis la scienca nomo de la animaleto kiun feliĉe Brigitte estis anticipe nominta per la traduko de "crevette grise", t.e griza salikoko. Gustuminta la agrablegan preparaĵon, de kiu Brigitte estis alportinta specimenon, mi rehejmeniris, kun la nepra intenco tuj serĉadi en interreto, detalojn pri la koncernita estiminda marestuleto.

Tiel mi lernis ke tiu membro de la familio de la krangonidoj (ordo de dekapodoj, klaso de malakostrakoj, por la sciemuloj !) estis parencoj de alia mara speco, la "skiloj". Tie mi konfesas ke mi devis inventi la vorton : ĝi ne estas en la PIV, kaj esperanto ne aperas en Vikipedio inter la lingvoj kiuj pritraktas la temon, ĉar verŝajne la esperantistoj kiuj ĝis nun dediĉis tempon al tiu animalo, ne estis tre multnombraj. Do mia vorto "skilo" tute simple originas de la franca vorto "squille" (prononcu "skij").

Kial mi parolas pri "skiloj", fremdaj je la Brigita kuko ? Ĉar tiuj bestoj estas rimarkindaj !
Vi mem juĝu.

La skiloj estas krustacoj de 3 ĝis 8 cm-oj longaj, kiuj vivas en la india kaj pacifika oceanoj, kaj ankaù iom en la orienta Mediteraneo. Ili estas karnovoraj, kaj manĝas ĉiuspecajn konkulojn, salikokojn, kaj ĉiujn kompatindajn bestetojn kiuj pasas je ilia atingopovo. Ĝis tie, estas nur banalaĵoj en la vivanta mondo. Sed la skiloj fariĝas rimarkindaj rilate jenon.

1) Ili posedas la plej akran vidkapablon ekzistantan en la vivantaro :
Homo estas eksterordinara estaĵo, ĉar kvankam li ne vidas tiom bone kiom la skiloj, li almenaù kapablas scii kial tiel estas. Kaj jen lia klarigo : Nia retino konsistas interalie el milionoj da apartaj ĉeloj, nomitaj "konusoj" pro ilia formo, kiuj estas lumriceviloj. La homa la retino posedas tri malsamajn tipojn da konusoj, ĉiu tipo estante sensopova je aparta gamo de ondolongo de la lumo. La skiloj, ili, posedas 12 tipojn da specialigitaj konusoj ! Estas la monda rekordo. La skiloj do multe pli kapablas akre vidi ol kiu ajn alia vivantulo, interalie distingi la nuancojn de koloroj. Tio verŝajne klarigas kial la korpo de la skiloj estas tiom divers- kaj vivkolora. Tiovidu ĉe interreto !

2) Ili posedas du kvazaù brakojn, fleksitajn sur sin kiel tiuj de la insekto "manto". Sed kontraùe de la mantoj, ili kapablas defleksigi tiujn brakojn kaj ilin antaùen lanĉi al siaj predoj kun eksterordinara rapideco. Scienculoj komparis, kaj konkludis ke la rapideco de lanĉo de la skilbrakoj estas la monda rekordo de rapideco de kiu ajn organo en la tuta vivanta mondo. En mekaniko, oni scias ke kiam peco de materio frapas ion, la frapefiko dependas de du faktoroj, la maso kaj la rapideco de la frapantaĵo (e = mv ). Tiel, eĉ se la maso de la skilbrako ne multe pezas, pro ĝia grandega rapideco la efiko de frapo estos fortega. Tiel, plurfoje frapinta krabon aù konkulon, skilo sukcesas rompi la karapacon aù la konkon. Vi povos tion observi per videaĵoj en interreto. Pro tio skiloj povas grave vundi homojn kiuj nevole marŝas sur ilin, aù volas ilin kapti sen la necesaj singardoj. Oni kalkulis ke se la homa brako, multe pli peza ol tiu de skilo, kapablus atingi la rapidecon de la skila brako, ĝi povus lanĉi ŝtonon ekster la tera gravito !

Do, dankegon al Brigitte, kies krangonkuko kondukis al tiaj ekstergastronomiaj konsideroj.

## Uzu kaj reklamu la retkursojn !

Flugfolioj aŭ reklamoj en la gazetaro ne plu sufiĉas por varbi. Estas sciate, ke la lokaj kluboj baraktas por trovi novajn anojn, ĉefe junajn, pro distancoj tro grandaj, pro horaroj malkongruaj kun la laboro aù la studado, pro familiaj taskoj, pro tiom da aliaj kaŭzoj kiujn la tieldirite « moderna vivo » postulas de la junaj generacioj. Sed estas ankaŭ sciate, ke Esperanto allogas plu ilin kaj la uzantojn de interreto. Ĉu ? Do, senhezite ni uzu la modernajn komunikilojn ! Ekzemple, Patrice Dufeu (Le Havre), Yves Nicolas (Hérouville) kaj Rémi Troisgros( Carentan) fariĝis korektantoj por iKurso*. Iliaj lernantoj estas majoritate junaj kaj granda parto de ili loĝas en Normandio. Plej multaj, jes ja, rezignas antaŭ la fino de la kurso, sed pluraj entuziasme progresas en la uzo de la internacia lingvo. Tiu korektado tre utilas por la nacia kaj la regiona movadoj. Estus bone se iKurso havus ankaŭ korektantojn en Orne kaj Eure ! Jen interesa atesto de Patrick Guillot kiu antaŭ nelonge lernis Esperanton per interretaj kursoj. (La red.)

“Mi loĝas en Houlgate kaj eklernis esperanton antaŭ du jaroj per Duolingo*, Lernu.net* kaj lernolibroj. Por plibonigi mian nivelon, mi decidis tiun someron sekvi du kursojn per iKurso kaj Ekparolu*.

Ikurso estas kurso per interreto, "cours en 10 leçons" por la komencantoj kaj "Gerda Malaperis" por la dua nivelo. Mi elektis la duan. Ĝi enhavas interesajn rakonton, gramatikon, vortaron kaj ekzercojn. Korektanto, Y. Nicolas, korektis miajn erarojn kaj donis al mi konsilojn.

Ekparolu estas kurso en la retejo: Edukado.net*. Oni povas interparoli kun spertaj esperantistoj. Mi trapasis tri testojn, kaj poste mi iĝis "nevo". Mi elektis 10 sesiojn. Kun "onklo" mi babilis 30 minutojn per skajpo pri la prononcado, la gramatiko, la lernmetodo, la retejoj por uzi la lingvon ktp. La onkloj estis el Nederlando, Usono, Italujo, Hispanujo, Hungarujo, Danujo kaj Serbujo ! Mirinde kaj kuraĝige ! Mi povis kompreni ilin kaj sufiĉe flue paroli.

Konklude, mi devas multe labori ! Sed, la rimarkoj, la eraroj kaj la korektoj tre utilas por progresi. Mi rekomendas la retkursojn iKurso kaj Ekparolu al ĉiuj komencantoj kaj progresantoj ».

*Tiuj lerniloj kaj retpaĝoj estas facile kaj senpage interrete atingeblaj

**Patrick Guillot (14)**



---

**AMIKUMU.COM** : proksimaj esperantistoj tuj kontakteblaj per via poŝtelefono !

Jen la aplikaĵo pri kiu ni ĉiuj revis : Amikumu. Senpaga aplikaĵo kiun vi povas elŝuti ĉe https://amikumu.com/fr/, havebla por Android kaj iOS ( poŝtelefonoj kaj tabulkomputiloj )

Post enskribiĝo, tre facila, vi iĝas ano de la Amikumu-komunumo. Amikumu ne nur estas tuj-mesaĝilo, sed ankaŭ ebligas vin vidi kaj kontakti ĉiujn esperantistojn cirkaŭ vi, ene de 200 kilometra distanco. Tre utile por konatiĝi kun esperantistoj de via regiono.

Tiu aplikaĵo evoluas, tago post tago, baldaŭ aliaj lingvoj estos aldonitaj, kaj ankaŭ elekt-kapabloj laŭ viaj gustoj,hobioj, distancoj, landoj, ktp …

Tial, adoptu kaj ĝuu Amikumu-n !




**Patrice Dufeu (76)**

---

## Bicikladu kun Rose kaj Cyrille !

Por tion fari vi ne bezonas rajdi biciklon… Sufiĉas tajpi per via klavaro “horizonto.net/index.html”. Vi tiam akompanos esperantistan paron kiu faras sian duan bicikladon ĉirkaù la mondo.

Ili humure en la franca kaj en Esperanto priskribas ĉiun etapon kaj aventurojn. Vi ankaù povas subteni ilin. Nepre vizitu ilian retpaĝon !

La grupo en Le Havre havas Facebook adreson : « esperanto le havre heg » kaj la grupo de Hérouville, blogon : « herouvilleesperanto.blogspot.fr »

**Pritraktitaj temoj dum la Ĝenerala Asembleo**

33 homoj el Normandio kaj 2 invititoj, Mikaelo Bronŝtejn kaj Françoise Noireau, partoprenis la Ĝeneralan Asembleon en Flers la 13an de majo.

**Morala Raporto pri 2016 :**

Forpasis tri membroj : S-ino Millet, kaj s-roj Loisel kaj Colombel.
3 bultenoj redaktitaj kaj enpaĝigitaj de la grupo de Hérouville.
Ĝenerala Asembleo en Montivilliers kun 25 el la 71 aliĝantoj de Esperanto-Normandie.
Dua Turista Tago en Granville, en oktobro.
Buĝeta saldo fine de 2016 : 2388 € (2014 : 2424 €, 2015 ; 2296 €)

**Nuna situacio kaj projektoj** :

Post la subita forpaso de Jean Colombel okazis Estrara Kunveno en marto ĉe Véronique Girard en Villers-sur-Mer. Sylvie Caron fariĝis la kasisto kaj ŝia propra adreso la oficiala adreso de la asocio. Sylvie prizorgis la deklaron en la sub-prefektejo de Le Havre.
Fine de marto, akcepto de Duncan Charters, usona universitata profesoro, membro de la e-o akadamio. Konferenco en Hérouville kaj en Avranches.
La bulteno aperos trifoje jare. La dua aperis en aprilo kun koloraj fotoj (pro eraro de la presisto sed sen kroma elspezo de nia asocio) kaj aparta dosiero pri la hispanaj esperantistoj dum la civila milito.
**La Tria Turista Vizito devus okazi la 14an de oktobro en Caen**.
**La Ĝenerala Asembleo 2018 devus okazi en L'Aigle** en junio dum dato decidota.
Pliaj kontaktoj necesaj kun Pascal Hébert, loka esperantisto, kaj la asocio « Les hommes fourmillent » kiuj prizorgos la akcepton, antaù ol konfirmi la aferon. Prelegus ge-samideanoj Normand Fleury el Kebeko.
Kontaktoj kun la grupo « La Kampanoj » (kiu tre sukcese kantis Brel en Lille kaj dum la Zamenhofa Tago en Malicorne-Sarthe) por eventuala turneo en Normandio en marto 2018. Ĉiu loka grupo enketu por scii ĉu la afero povus okazi surloke. Kontakto ankaù kun SACEM pri la oficialaj deklaroj kaj kostoj.
La nova estraro konsistas el delegitoj de la 5 departementoj : Yves Nicolas, Jean-Pierre Sauvage (Calvados), Barthélémy Maurau (Eure), Christian Lévesque kaj Françoise Glémot (Manche), Anne-Marie Leprévost (Orne), Sylvie Caron kaj Matthieu Lecesne (Seine-Maritime). Prezidanto : Y. Nicolas, Kasistino : S. Caron, Sekretariino : A-M. Leprévost

**Anne-Marie Leprévost kaj Yves Nicolas**

**La Fête à Flers !**

Imaginez notre petit groupe de 6 puis 5, chronométrant nos essais de circuits pédestres dans notre bourgade !!! Un premier essai ensoleillé, frisquet (en hiver !), avec 2 tablettes du syndicat d'initiative nous permettant, à certains repères verts des trottoirs, de voir des cartes postales anciennes et d'entendre des infos ou anecdotes sur l'endroit où nous nous arrêtions.
Inutile de préciser que ce jour-là nous avions « explosé » la durée « maximale » que nous nous étions fixée…
Le second essai, sous un ciel « si bas » que nos parapluies s'avérèrent très utiles, fut plus « folklorique » car, ayant achevé certaines traductions des documents de l'Office de Tourisme puis sélectionné circuit et arrêts, nous lisions nos textes à tour de rôle. Si vous aviez vu la tête des badauds ! Nous nous sommes faits sensiblement remarqués. Pas mal comme exercice pour les méninges, mais un « nouveau coupage » s'est avéré indispensable car notre marche avec commentaires durait 2 fois trop ! Et, quand le programme de l'AG, articulé autour de nos 2 conférenciers ZEF et Mikaelo BRONSTEIN s'est mis en place, avec sa conclusion à l'Auberge du Noyer pour le repas du soir, nous avons dû diviser encore par trois le circuit de la visite.
Avez-vous, chers visiteurs qui avez couru derrière Miŝa et moi, en ce samedi ensoleillé, pris conscience de tous ces changements ? Mesurez-vous le plaisir fou, que nous avons eu dans cette préparation pour redécouvrir et choisir certains lieux flériens ? Et avez-vous partagé, nous l'espérons, le plaisir plein d'émotions que nous avons eu en vous accueillant dans cette Zone à Urbaniser en Priorité (quartier St-Sauveur, l'une des 2 ZUP flériennes) où nous nous rencontrons chaque mardi (14h30-16h15).
Pétillant, ZEF nous a surpris, en modifiant, en recréant en solitaire un nouveau montage de ses diaporamas de voyages planétaires à vélo.



ZEF

suite p.7

Chaleureux, les instants dans le hall et les couloirs où Françoise au violon, Mikaelo à la guitare, Olga en chansons et bien d'autres ont fait vibrer les cloisons et nos âmes. Inoubliable la plongée dans l'enfance de Mikaelo, us et coutumes aux langages et musiques variés à la manière de Zamenhof.

Délicieux et gai le dîner des 26 pouvant prolonger la fête, alors que 9 avaient repris la route longue du retour à la maison ... Excusez le café « trop léger », non corsé ou insuffisant, l'interdiction d'alcool dans la structure d'accueil.
Mais alors, quelle fête, quels souvenirs…



Mikeolo et Françoise

MERCI à CHACUNE et à CHACUN !

**Anne-Marie Leprévost (61)**

Très présents, malgré leur absence physique, ceux qui m'avaient écrit leur incapacité à venir et notre amie décédée Michèle Blin.
Dense, constructive cette A.G. d'après le décès de Jean Colombel.



au 1er rang, de gauche à droite Yves le Président,
Mikaelo, Miŝa, Jean-Pierre , Olga et derrière Olga, Anne-Marie.

**DU PRELEGANTOJ VIZITIS NORMANDION**
Du prelegantoj vizitis Normandion en marto kaj en junio.
La unua prelegis kadre de turneo de Esperanto France. **Duncan CHARTERS**, universitata profesoro en Usono i. a. pri la hispana kulturo, estas brite devena. Membro de la Akademio, li famas en Esperantujo kiel pedagogo. Ĉeestis lian prelegon pri komunikado en Hérouville pli ol dudek homoj de la loka klubo sed ankaù de la Manche kaj Orne kluboj.
Duncan ankaù prelegis en Avranches dank'al Véronique Bessin kaj Patrick Etienne, lokaj esperantistoj kiuj ankaù partoprenas solidareman asocion por interŝanĝi scipovojn kaj helpojn. La kunveno okazis en urba kunvenejo kaj estis bone anoncita en la loka gazetaro (paro eĉ venis de Fougères dank'al gazetreklamo). Pli ol dudek homoj tre atente aùskultis la prelegon de Duncan kaj abunde metis demandojn pri esperanto kiun videble plej multaj elkovris okaze de tiu renkontiĝo.
En junio, ni akceptis **Guilherme FIANS**, juna brazilano por kiu ni organizis tre sukcesan turneon en Francio kelkajn monatojn antaùe. Guilherme nun doktoriĝas pri etnonologio en brita universitato kaj elektis kiel studtemon la francan komunumon. La turneo, kompreneble, helpis lin enprofondiĝi en tiun medion kaj ni esperas, ke lia mallonga restado en nia klubo iel kontribuis al tiu pripensado. Dudek homoj spektis interesan diaporamon pri Brazilo kiun malŝablone prezentis nia vigla gasto.



Duncan Charters en Avranches



Guillermo Fians

## Esperanto muziko en Normandio



La 16an de septembro 2017 kune vespermanĝis, en memserva restoracio en Granville, 18 esperantistoj el Avranches (Véronique Bessin kaj Patrick Etienne), Carentan (Rémi Troisgros), Coutances (Annick Mulot, Odile kaj Philippe Bony), Granville (Annick Besneville, Nelly Payen, Christian Lévesque) Hérouville (Francine kaj Jean-Marie Fortin, Brigitte kaj Pierre Cottin, Marie-Anne Piette, Claude Ferrand, Jean-Pierre Sauvage, Yves Nicolas) kaj Rusio (Olga Beliaeva). Poste la grupo karavane iris ĝis Saint-Pierre-Langers, kie ankaù ĉeestis Françoise Glémont (Granville), por aùskulti la koncerton de Githarpo. En la bela preĝejo, speciale ornita de floroj por la koncerto, baldaù la multnombra loka kaj esperantista publiko varme aplaùdis ĉarmajn muzikojn kaj esperantajn kantojn de tri harpistinoj (du de Granville kaj Laurence Confesson) kaj de Lino Markov, denaska esperantisto. Ĉi-sube, Lino prezentas la laboron de Githarpo. (La red.)

« Inter la 16a kaj la 21a de aùgusto 2017 okazis serio de 4 koncertoj en Normandio laù la temo "originala muziko en esperanto". Loka asocia grupo "HADM" (Harpes Autour Du Mont, harpoj ĉirkaù la Monto Sankta Mikaelo) organizis artan rezidejon por la ensemblo Guitharpe ("githarpo"), profesia muzikgrupo kun Laurence Confesson, harpo, Fabien Rybakowski, gitaroj kaj kanto, kaj banĵolino, Lino Markov, gitaro kaj banĝo, en la urbo Jullouville, kie ĝi kunlaboris kun harpistaj muzikantoj ĉirkaù repertuaro el diversaj originoj, i.a. originalaj verkoj en esperanto.

Kadre de tiu renkontiĝo, Guitharpe prezentis koncertojn per subteno de HADM kaj 1 koncerton akompane de la harpaj muzikantoj, fine de la renkontiĝo. Tiuj koncertoj okazis en la preĝejoj de Jullouville, Saint-Pierre-Langers kaj Saint-Jean-le-Thomas. La konsisto de Guitharpe, jam sufiĉe malkutima (harpo kun 2 gitaroj kaj banĝo kun voĉoj) ebligis prezenti repertuaron de kantoj entute verkitaj en esperanto, ĉefe laù poemoj de E. Miĥalski (1897-1937), kiujn publiko malkovris per sincera intereso kaj ĝojo. La arta celo de Guiharpe, freŝe naskita ĉi-jare, estas serĉado, pristudo, kompilado kaj prilaboro de verkoj originalaj en esperanto, por malkovrigi al publiko la riĉecon de muziko en esperanto.

Interŝanĝoj, demandoj kaj informoj pri kaj ĉirkaù esperanto estis tre riĉaj kaj entuziasmaj, eĉ kelkaj esperantistoj troviĝis en la publiko : tiu-ĉi punkto ekvekis scivolemon de la urbestro el unu koncertejo, kiu konfesis ke lin impresis vidi esperantistojn interparoli en esperanto.

Notindas mencii ke tia oficiala kadro ebligas doni al esperanto kulturo apartan fenestron antaù la publiko ».

**Lino Markov**



Odile Bony, Laurence Confesson avec Lino Markov

**Sabato la 14 an de Oktobro 2017**

Vizito de Hérouville-Saint-Clair kaj Caen



***Pliaj informoj en la venonta bulteno kiu aperos en januaro 2018 : bonvolu sendi viajn artikolojn antaù la fino de novembro.***

*JAM KOTIZU POR 2018 (aliĝo al la normanda asocio kaj abono al la bulteno)*
*REGLEZ DES MAINTENANT VOTRE COTISATION 2018 (adhésion à l'association normande et à son bulletin)*
*10 €. Ĉeko al « Esperanto-Normandie », ccp 283.40 H Rouen*
*Sendu ĝin al : Sylvie Caron, 44, rue Gustave Lennier, 76 600 Le Havre*